



LA JUNA VIVO

OFICIALA MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio kaj Administracio: TJO-Centro, West-Grafdijk (NH), Nederlando
Gironumero 382363 Jarabono 3 guld. aŭ egalvaloro

ARTIKOLOJ KAJ NEŬTRALECO.

Kelkfoje oni plendas, ke L.J.V. ne estas sufiĉe interesa, ke ĝi enhavas tro malmultajn artikolojn, kiuj en larĝaj tavoloj de la junularo tiras la atenton kaj instigas al diskutado.

En Haarlem montriĝis, ke oni ŝatas artikolojn, kiaj „La Junuloj antaŭ la Vivo“ kaj kelkaj promesis verki pri samspecaj temoj. Malmulto ankoraŭ venis

Tio ne estas riproĉo al tiuj personoj, ho tute ne! Mi mem spertas samajn malfacilaĵojn. Por pluraj estas malfacile kunmeti interesan legaĵon, eĉ se ili estas spertaj esperantistoj, sed ankoraŭ multe pli malfacile estas, eĉ se oni majstras la lingvon kaj scias ĝin apliki en logajn verkaĵojn kun eĉ beletristikaj ecoj, trovi **temon**, kiu jam antaŭe promesas vastan rondon da interesuloj.

Ĉu efektive estas tiom malmultaj temoj interesaj?

Verŝajne ne, sed multaj estas tendencaj kaj sekve retenas nin trakti ilin: neŭtralaj Esperanto-gazetoj kia „La Juna Vivo“ ja ne presigas tiajn artikolojn!

Kaj tamen oni tiamaniere forprenas de ni gravan parton de la diskutoterenon, parton, kiu eble pli bone kondukus al reciproka estimado kaj komprenado de niaj ideoj kaj konceptoj ol la pritrakto de aferoj, kiuj, kvankam tute neŭtralaj, kelkfoje ne meritigas sinceran pripensadon.

La regularo de T.J.O. diras, ke ĝi estas supertendenca rilate al naciaj, religiaj, rasaj kaj politikaj konceptoj, sed ĉu tio ankaŭ volas diri, ke oni ne diskutu pri temoj, kiuj, koncernas al la ĉisupraj konceptoj?

Jen afero, kiu kelkfoje embarasas la estraron. Ĝi ekzemple konsentis pri la aperigo de la unua artikolo pri militrifuzado, fakte jam limkazo. Ĉu ĝi tamen devos rifuzi samtemajn artikolojn kun purpolitika tendenco?

Volonte ni scius viajn opiniojn pri ĉi tiu afero.

T. K.

RY, LA URBO DE NIA 8-a IJK.

Sur la duoninsulo JUTLANDO (Jylland) la urbo ÅRHUS jam estas iom konata de la plej multaj eksterlandanoj. Kaj nur 30 km de Århus (per trajno unuhora veturado) oni trovas la kongreslokon de la 8-a IJK: RY. La nomo signifas „famo” kaj espereble ĉi tiu naturbela loko havos bonegan famon inter vi, kiuj venos por esti kune kun ni. Per la trajno vi facile veturas rekte al Ry. Kiam vi staras kun viaj kofroj antaŭ la stacidomo vi eble ektimos, ke vi, kiel kutime, devos marŝi longan distancon, sed ne ĉijare! Vi simple rigardu trans la straton kaj kion vi vidos? La kongresejoj: RY HØJ-SKOLE (Altlernejo), kiu situas en granda ĝardeno sur la deklivoj, tuŝante rivereton.

Ry estas nur vilaĝo, kun proksimume 1500 loĝantoj. La erikejo, sur kiu ĝi fondiĝis, estas ĉirkaŭata de grandaj arbaroj, multaj altaĵoj, vastaj lagoj kaj ĝin preterpasas la plej granda rivereto de la lando, GUDENÅEN. La akvoorto transformiĝas al elektro. Sur la rivereto kaj sur la lagoj oni veturas per remboatoj, kanotoj, vel- kaj motorŝipoj.

La unua celo de vizitanto kutime estas HIMMELBJERGET (la ĉielmonto), 147-metra teraltaĵo ĉe la bordo de la ĉarma lago JULSØ. De la supro oni havas vastan elrigardon al la miksitaj pejzaĝo, lagoj, arbaroj, erikejkovritaj altaĵoj kaj fekundaj kampoj. Oriente oni vidas RY, okcidente SILKEBORG kaj se la vetero favoras: la turoj de la ĉefpreĝejoj en VIBORG kaj ÅRHUS estas videblaj (distanco proks. 35 km). Sur Himmelbjerget ĝis niaj tagoj okazis grandaj popolkunvenoj kaj vi trovos multajn memorŝtonojn. Plej supre oni starigis 25 m. altan turon, memore al reĝo Frederik la 7-a.

Gammel Ry (malnova Ry) estas proksima, neordinara vilaĝo, en kiu ankoraŭ vidiĝas, ke ĝi en la mezepoka tempo estis urbo kun granda komerco.

Meze en la urbo oni ankoraŭ vidas la foirejon. La preĝejo ruiniĝis, kiam la urbo malpligrandiĝis, sed en 1912-a oni rekonstruis la turon, kiu, kvankam rekonstruita en la origina loko, nun estas sen kontakto kun la cetera preĝeja konstruaĵo.

En Øm ni vizitos ruinaĵon de konsiderinda Monaĥejo, konstruita en 1165-a. Dank' al elfosado farita de la Nacia Muzeo ni nun povas rigardi la restaĵojn de la konstruaĵoj kaj tre strangajn masonitajn tombojn de monaĥoj.

La regiono, en kiu Ry situas, estas tipa kreitaĵo de la Glacia periodo, kiam la valo ĉirkaŭ Gudenåen estis riverego, kiu forkondukis la degelintan glacieron de la giganta glacikampo, kiu kovris la tutan Skandinavion kaj eĉ grandan parton de Eŭropo. La pejzaĝo laŭlonge de la rivereto kaj la lagoj apartenas al la unue enloĝataj lokoj de Danlando, ĉar ĉi tie estis bonaj vivcirkonstancoj por la fiŝkaptistoj kaj ĉasistoj de la ŝtonepoko. En la Mezepoko la regiono estis centro de la interkomuniko de meza Jutlando kaj la multaj monaĥejoj. La sanktaj fontoj en Gl. Rye kaj la grandaj foiroj altiris multajn homojn al la regiono kaj la kulturecentro en Øm.

Venu al Ry por esplori ĉi tiun malnovan tempon kaj ĝuu kun gekamaradoj de diversaj nacioj la belegan naturon en la kutima interfrateca, sfero de niaj Junular-Kunvenoj.

Tre koran bonvenon al Ry!

Kaj Pedersen.

Oficialaj informoj pri nia 8-a I.J.K.:

Loka Organiza Komitato: Kaj Pedersen, Brønshøjvej 62, København.
Poŝtkonto: 73478. Banko: Den Danske Landmanskab, Holmens Kanal 12, København.

Daŭro: De la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto 1952-a.

Kotizo:

TJO-anoj ĝis 30-j.	Lernejo	Hotelo
	75 d.kr.	100 d.kr.
Pli ol 30 j. Ne-TJO-anoj	85 d.kr.	110 d.kr.

La kotizoj inkluzivas restadon, manĝaĵojn kaj ekskursojn.

Aliĝo: povas okazi nur per la oficiala aliĝilo kaj validas nur kun samtempa pago de 20 d.kr. Pagu rekte al la LOK aŭ al via ĉefperanto. Aliĝiloj povas esti akceptataj nur ĝis la 1-a de julio; de germanoj ĝis la 1-a de majo.

Vizo, pasporto: Zorgu por frutempa akiro de ĉiuj dokumentoj. Por germanoj la dana ministerio por internaj aferoj garantias 150 vizojn.

Turisma Faldfolio estas senpage havebla ĉe: Ry Turistbureau, Klostervej, Ry.

Karavanoj: Landaj sekcioj formu laŭeble komunajn vojaĝojn.

Invitilo kun detalaj informoj aperos en la daŭro de januaro. Petu senpagan ekzempleron ĉe la LOK.

Provizora programo: Antaŭvidataj estas: interkona vespero, oficiala malfermo, komuna fotografiĝo, prelego kaj filmprezentado, laborkunsidoj de TJO, festvespero, internacia balo (kunportu naciajn kostumojn!), tuttaga ekskurso al Arhus kaj vizitado de la belegaj ĉirkaŭaĵoj de Ry. (Himmelbjerg).

Ĉiujn informojn volonte donas la LOK. Petante specialajn informojn, ĉiam aldonu int. respondkuponon.

Militrifuzado.

En la dec. n-ro de LJV la fina paragrafo de la letero de Jean-Louis Texier pensigis min. Li opinias, ke li pli libere povos labori por la paco se li portas uniformon, ol se li sidas ĉirkaŭita de kvar muroj en karcero, ĉar „nenion faras tiuj, kies manoj estas ligitaj.”

Mi respektas ĉiun sinceran esprimon de opinio, sed mi tamen deziras aldoni pluan penson por la konsidero de Jean-Louis Texier.

Se ni ĝisfunde konvinkigis ke la milito estas krimo kontraŭ Dio kaj la homaro, se ni kredas ke la mondharmonio venos nur per la reekvilibrigo de multaj individuaj vivoj, ĉu niaj „porpacaj” vortoj ne ŝajnos vantaĵ, se ni fakte militservas?

Oni plej bone predikas per ekzemplo. Ĉiu, kiu studis la vivon de Ghandi, komprenos la profundan signifon de tiu aserto. Ghandi ofte malliberiĝis, sed ĉe li agoj parolis pli laŭte ol vortoj.

Libereco estas afero de la spirito, ne de la korpo. Militrifuzanto, kiu havas

la kuraĝon suferi enkarceriĝon prefere ol subteni la principon de fratmur-
 dado, tute ne estas mallibera aŭ senpotenca. Lia vivo estas radianta lumo en
 malesperanta mondo.

L. Gordon Watson, Anglujo.

AL VI, BELA

1 = Bb, 6/8.

Bb*)	C ^{min.}	F7	Bb
3 4 5 6 5 0 1 2 3 4 3. 0 4 3 2 6 1 7 4 6 5 . 0 0 3 4			
5 6 5. 0 1 2	3 4 3. 0 4 3	C ^{min.}	F7
5 6 5. 0 1 2	3 4 3. 0 4 3	2 6 1	7 6 7
G ^{min.}	D	D7	Eb
6 7 6. 0 5 6	7 . 3	0 1 7	6 . 7
			D
			Bb
			3 . . 3 3 4
Bb	C ^{min.}	F7	Bb
5 6 5. 0 1 2	3 4 3. 0 4 3	2 6 1	7 6 7
			Bb
			1 . . 1

1.

Al vi, bela amatino, ĉian benon donis Di',
 Venu, mia karulino, en la barkon tie ĉi.
 Vi aŭskultos korsekreton, kie aŭdos ĝin neni',
 Do ensaltu la gondolon kaj eksidu apud mi.

2.

Ĉar okuloj viaj brilas kiel steloj en ĉiel'
 Kaj la buŝo nun distilas la dolĉecon de miel',
 Mi kisados la buŝeton, kie vidos nin neni',
 Do ensaltu la gondolon kaj ripozu apud mi.

Klarigoj pri la ciferaĵ notoj estas troveblaj sur la paĝoj 13-a kaj 27-a. Bonvolu konsulti ilin. Super ĉi-supra kanto estas la indiko: 1 = Bb (Diru: Bbe. Nederlandanoj diras Bes; germanoj: B). Do 2 = C, 3 = D k.t.p. laŭ la tonskalo kun du bemoj (du nigraj k'avoĵ). Ciferoj suŝ unu streko signifas okonajn notojn; tiuj sub duobla streko deksekonajn notojn. Ĉi tiu kanto estas ses-pu'sa. Por bonaj muzikantoj la baslitteroj sufiĉos por trovi la ĝustajn akompanajn akordojn.

*) Baslitteroj por akordionoj, gitaroj k.t.p. Kompletaj muziko trovebla en „Internacia Kantaro“ de P. Bennemann, p. 78, mendebla ĉe Libro-Servo T.J.O.

PARIZO ESTAS DUMIL-JARA.

En la jaro 1951-a la ĉefurbo de Francujo ornamis sin per ĉiuj siaj flagoj, iluminis siajn monumentojn kaj organizis senkomparajn festadojn por soleni okazon neordinaran, nome sian dumilan aĝjaron.

Paradoj, koncertoj, ĉiaj festadoj sekvis unu la alian, precipe dum la monatoj aprilo ĝis aŭgusto.

Ĉiuj kvartaloj de Parizo partoprenis la festadon. La komercistoj de la plej famaj stratoj prezentis en siaj montrofenestroj diversajn epokojn kaj okazaĵojn el la historio de la urbo. La fama avenuo Champs-Élysées, ekzemple, sin dediĉis al la epoko de la dua Imperio. La komercistoj de populara strato de la malnova kaj pentrinda insulo Saint-Louis ornamis siajn butikojn per elpendaĵoj laŭ la mezepokaj kutimo kaj stilo.

La tagon de la usona „Independance Day” paradis la „Respublikaj Gvardianoj” en kostumoj de „Naciaj Gvardianoj de La Fayette” (Generalo La Fayette estis la estro de la francaj trupoj, kiuj en la 18-a jarcento helpis la Nord-amerikanojn en ilia milito por sendependeco).

Ĉiuj muzeoj, ĉiuj bibliotekoj organizis specialajn ekspoziciojn sur diversaj terenoj de la vivo de Parizo. La Radiofonio faris specialajn elsendojn pri la historio de la ĉefurbo. Ĉiuvespere la ĉefaj monumentoj de Parizo estis iluminataj k.t.p.

Du gravaj muzikaj okazaĵoj markis tiun jubilean festadon. Dum junio, en la granda kvadrata korto de Palaco Louvre okazis vespere granda koncerto, kies temo estis „La gravaj momentoj de la historio de Parizo” kaj dum kiu estis aŭdigata la fama Te Deum de Hector Berlioz. Dum julio, sur la Esplanade des Invalides, la pariza popolo povis aŭskulti publikan koncerton de militista muziko, kiun partoprenis alilandaj militistaj orkestroj (el Belgujo, Nederlando, Svisujo k.a.) kaj kiun ĉeestis la urbestroj de ĉiuj alilandaj ĉefurboj, invititaj de la „Granda Dumilo”. La saman tagon, sur la sama loko, okazis ankaŭ prezentado de folkloraj dancoj kaj kantoj fare de folkloraj trupoj el diversaj provincoj de Francujo.

Kompreneble la solenado pro la dumiljareco estis okazo por la mondomaj kaj riĉaj medioj de Parizo por organizi luksajn kunvenojn kaj festadojn. Sed la pariza popolamaso estis regalata per eksterordinara kaj nekredebla spektaklo: temas pri giganta artfajraĵo „elpafita”, el la korto de Invalides, verkita de la mondfama firmao Ruggieri kaj ĉeestita de la alilandaj urbestroj kaj proksimume tricent-mil parizanoj, amasiĝintaj sur la Esplanade des Invalides kaj sur la bordoj de Seine. Tiu artfajro daŭris tri horkvaronojn kaj prezentis diversajn momentojn el la historio de Parizo per simbolaj bildoj. Dum laŭtigiloj dissendis klarigojn kaj konforman muzikon, sinsekvis antaŭniaj okuloj la Prahistoriaj Tempo kun ĝiaj arbaraj fulmotondroj, la Mezepoko kun Jeanne d'Arc, la Reĝado de Ludoviko la XIV-a, „la Suna Reĝo,” kaj la Revolucio kun la apero de la trikolora standardo, la Imperio kaj ĝiaj abeloj, la Nuna Tempo kun la plej modernaj eltrovoj kaj efektoj en la piroteknika arto. Poste sur la sama loko kvar orkestroj dancigis la publikon dum la tuta nokto.

Sed la plej bela iniciato kaj realigo el ĉiuj tiuj solenaĵoj estis miaopinie la prezentado sur la granda placo de Notre Dame de „Le Vray Mistère de la Passion” („La Vera Mistero de la Kristmorto”).

Por tiuj, kiuj ne konas tiun specialaĵon de la franca mezepoka literaturo, mi klarigu, ke la „misteroj” estis dum la Mezepoko teatraĵoj, kies temo estis religia okazaĵo (plej ofte la vivo de Kristo, kelkfoje ankaŭ la vivo de iu sanktulo) kaj kiuj estis ludataj, komence en la preĝejo mem, poste sur la antaŭpreĝeja placo. Tiuj prezentaĵoj tiam estis organizitaj de la Eklezio por instrui la popolon kaj luditaj de bonvolaj, neprofesiaj aktoroj. Sed poste profesiaj aktoraroj sin specialigis en tiu speco de spektaklo. Tiu kutimo malaperis pro malpermeso de la Eklezio mem.

Depost kelkaj jardekoj oni revivigas tiun kutimon kaj „misteroj” estas ludataj ĉiujare en diversaj urboj de Francujo (tia iniciato estas laŭdinda, ĉar en kelkaj aliaj landoj, ekzemple en Germanujo, kie estas famkonata la ĉiudekjara Mistero de Oberammergau, tiu kutimo neniam perdiĝis kaj daŭre vivas). Sed verŝajne oni neniam en Francujo atingis la grandecon kaj belegecon de la pariza prezentaĵo. La fama katedralo Notre Dame estis kvazaŭ fondekoracio por la giganta scenejo muntita antaŭ ĝi. La granda placo Notre Dame estis plenigita per ligna ŝtupara konstruaĵo, kiu entenis dekmil sidlokojn. Specialistoj havis gravegan laboron por lokigi laŭtigiloj, ordigi la lumigadon k.t.p.

Oni ludis parton el la Mistero de Arnoul Gréban, verkita en 1452-a, la plej fama el la Mezepoko (oni ludis nur parton, ĉar la originalo estis tiutempe ludata en kvar tagoj), kiu enhavas entute 35.000 versojn. Oni ludis ĝin laŭoriginale, tio estas en la tiama malnova franca lingvo, kiu estas kelkfoje malfacile komprenebla de nekleraj personoj. Ĝi necesigis la partoprenon de tricent aktoroj. Ĝin partoprenis ankaŭ pluraj famaj horoj, la fama dancistinaro de Janine Aslane, la Rajdantaj Trumpetistoj de la Respublika Gvardio, la orgeno kaj sonoriloj de la Katedralo.

Nepriskribebla estas la grandiozezo de tiu spektaklo. Oni nur juĝu laŭ la efekto: la spektaklo okazis dum du semajnoj kaj ĉiuvespere la dekmil-sidloka ŝtuparo estis plenplena. Tiun organizadon ni ŝuldas al s-ro Aldebert, direktoro de la Nacia Popola Teatro de Chaillot.

Vere, oni povas diri, ke Parizo digne kaj inde festis siajn dumil jarojn. La parizanoj ja iel rajtas fieri pri sia urbo, kiu tiras al si ĉiujare centmilojn da turistoj. Kaj ĉar ni tre verŝajne ne havos la okazon ĉeesti la trimilan datrevenon, ni ja pravis, atendente, solene kaj ĝoje festi la dumilan, ĉu ne?

Michel Duc Goninaz, Parizo.

El la Montmartra — kaj esperanta — kabareto „La Tri Koboldoj”.

1.

La samidean' esperis
Gvidi Esperantan kurson,
Sed lernantoj malaperis
Kaj nun restas nur eks-kurso!

2.

La ministroj de l' naci'
Faras planojn kaj sistemojn.
Prave diras tiuj ĉi:
„Ni laboras per-sisteme!”

Mihaelo, Parizo (kopirajto rezervita).

Ĉu vi jam pagis vian kotizon ĝis 1/9 '52-a?

ORGANIZAJ INFORMOJ.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned.*)

Du landaj TJO-sekcioj eldonis bultenon. Belgujo: inter pluraj interesaĵoj, ni speciale atentigas pri la starigo de biblioteka servo por la belgaj anoj. Imitinda ekzemplo por la aliaj landaj sekcioj! Oni anoncas la baldaŭan aperon de dua bulteno, kiu eliros en la du naciaj lingvoj. — Preso ankoraŭ pli boniginda.

Germanujo: donas resumon pri la TJO-laboro, farita en Germanujo de 1950. Plie detalaj informoj pri komuna vojaĝo al la 8-a IJK.

Nederlandanoj! Aperis la 4-a n-ro 1951 de la nacilingva propagandilo „De Esperantist”. Ni tre rekomendas al niaj nederlandaj kaj flandraj membroj vaste uzi ĝin. Prezo 10 c.

Ĉeĥoslovakujo: Ni ricevis n-ran 14-an de „Juna Voĉo”, en kiu ni i.a. trovis raporton pri la 1-a Tutslovaka Junulara Kunveno, okazinta la 21-an de oktobro en Svit, kantojn kaj multajn sciindaĵojn.

Ni gratulas niajn geamikojn en ĈSR, kiuj daŭre alte tenas la verdan standardon!

Britujo: Kiu pretas gvidi britan karavanon al la I.J.K. en Danujo? Li bonvolu interrilati kun la ĉefesperantino: F-ino N. Rees, Seven Sisters, Neath, S. Wales.

Universala Esperanto-Asocio (Centro de Esploroj kaj Dokumentado).

Komisiite de la estraro de U.E.A. prof. d-ro Ivo Lapenna starigis „Centron de Esploroj kaj Dokumentado” (C.E.D.)

Unu el la ĉefaj celoj de U.E.A. estas: disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto. Tiun saman celon havas ankaŭ multaj landaj kaj fakaj asocioj, inter kiuj kompreneble ankaŭ T.J.O. Unu el la taskoj de U.E.A. estas rekte intervenadi en la internaciaj medioj (U.N.O., U.N.E.S.K.O., k.t.p.)

Precipe dum la kontakto kun supremenciitaj organizoj granda malhelpo ofte montriĝis la manko de bona dokumentado. Tial ekfunkciis de la 1-a de januaro la Centro de Esploroj kaj Dokumentado. Inter ĝiaj multaj okupoj troviĝas: A. **Sciencaj esploroj:** lingvistikaj, sociologiaj kaj politikaj studoj. B. **Dokumentado:** i.a. enregistriĝo de ĉiuj pli gravaj dokumentoj, koncernantaj la problemon de internacia lingvo kaj la aktivecon de la Esperanto-movado (ekz. ĉe la Ligo de Nacioj antaŭ la milito, ĉe la U.N.O. post la milito); ellaborado de statistikoj pri la nombro kaj socia konsisto de la Esperanto-movado; bibliografia servo. C. **Informado:** verkado de studoj kaj artikoloj, dissendotaj al la kunlaborantaj institucioj kaj unuopuloj, por ke tiuj ĉi prizorgu publikigon en naciaj revuoj kaj gazetoj, verkado de alvokoj, flugfolioj kaj broŝuroj, kunmetado de tipaj prelegoj por diversaj okazoj, aktiva partopreno en ĉiuj internaciaj kongresoj kaj konferencoj, kie estas pri-traktata la lingva demando.

Ĉiuj personoj, kiuj, komprenante la gravecon de la Centro, deziras finance kontribui al la bona plenumo de ĝiaj taskoj, estos konsiderataj kiel apogan-

toj. Ili regule ricevados ĉiujn informojn pri la funkciado kaj la laboro de la Centro kaj pri la rezultoj, kiujn ĝi atingis.

En ĉiuj aferoj rilate al C.E.D. bonvolu vin turni al prof. d-ro Ivo Lapenna, 38, Fillebrook Road, London E. 11.

Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto.

Post la okazintaj elektoj de la Direktoroj de la Sekcioj de la Akademio de Esp. la estraro nun konsistas el la sekvantaj personoj: prez.: i-ro J. R. G. Isbrücker, Oostduinlaan 32, Den Haag, Ned.; vicprezidantoj: A. Cseh, Riouwstr. 172, Den Haag, Ned.; prof. E. Privat, Evole 3, Neuchâtel, Svisujo. La taskojn de la ĝenerala sekretario-kasisto provizore plenumas la prezidanto kun helpo de la Int. Esp. Instituto. Direktoroj de la div. sekcioj: Gramatiko: d-ro W. Lippmann, 1021 East 14th Str., Brooklyn 30, N.Y., Usono. — Literaturo: G. Avril, 60 Bld. Auguste Raynaud, Nice (A.M.), Francujo. — Ĝenerala Vortaro: prof. G. Waringhien, 7 Av. Léon Gourdault, Choisy-le-Roy, Francujo. — Teknikaj Vortaroj: J. Okamoto, 2435 Sinobi-cho, Ueno, Miekén, Japanujo. — Bibliografio: d-ro P. Neergaard, Gothersgade 158, Kjøbenhavn-K, Danujo.



KORRESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Bulgarujo: Mi dez.kor.k. geesperantistoj de la tuta mondo, inters. poŝtk.k. fotojn. B.Čačev, bvl. Tolbuhin 52, Burgas.

17-j. gimnaziano havas intereson pri sporto, sportgazetoj, bildk., fotoj, filmo ktp. A. Atanasov, str. „Gladstone” 79, Burgas.

Stojĉo N. Stojĉev, str. „Ivajlo” 117, Burgas, 17-j. gimnaziano, dez. kor. k.inters. bildkartojn, gazetojn, fotojn.

Finnlando: Komencantoj, sendu al mi 2-50 vial. poŝtm. Respondo garantiata. S-ro J. Sive, Sara.

Francujo: 10-17-j. gelernantoj dez.kor. kun lernejoj el ĉ.l., inters. poŝtm., poŝtk. Certe respondos. S-ro Contart, Rue Nationale, Norrent-Fontes (P.d C.) S-ro Mourlon G., 116 Rue Charles Keller, Nancy (M et M) dez.inters. poŝtm. k.ĉ.l. (posedas de Francujo kaj Saarlando).

Germanujo: Atentu: Mi vokas fotoamatorojn el ĉiuj landoj. Skribu al Ulrich Hennecke, Dortmund-Wellinghofen, Admiralstr. 6.

Por propaganda ekspozicio ni bezonas ĉiajn esperantaĵojn: librojn, broŝurojn, salutkartojn (prefere bildflanke afrankitajn), afiŝojn ktp. Adr.: Esperanto Propagand-Ekspozicio, str. Forn 19, Moyá (Barna), Hispanujo.

Internacia Konferenco de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj en Schluchsee (Germanujo) de la 17-a ĝis la 24-a de aŭg. 1952-a. Baza kosto: 15 dol. Interesaj studentaj problemoj estos pritraktataj. Krome oni prilaboras la fondiĝon de Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj. Interesatoj povos ricevi informojn (kontraŭ respondkupono) ĉe I.K.E.S.A., Laksegade 35, Kopenhago K., Danujo.

8-a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO DE T.J.O.
10.8—17.8 1952 en RY - DANLANDO

Aliĝilo

kun samtempa pago de 20 d.kr. laŭ la indiko en „La Juna Vivo”, n-ro 5,
januaro

Bonvolu skribi preslitere!

- s-ro
1. Familia nomo: s-ino
f-ino
 2. Antaŭnomo:
 3. Naskiĝdato:
 4. Nacieco:
 - Lando:
 5. Adreso:
 6. Profesio:
 7. (Nur por eksterlandanoj) N-ro de la pasporto:
 8. Ĉu T.J.O.-ano?
 9. Mi verŝajne povos kontribui al la vesperaj programoj kaj prezentos:
.....
daŭro ĉk minutoj.
 10. Mi petas helpon de miaj geamikoj. Mi povas pagi nur % (ne
malpli ol 65 %) de la kostoj.
 11. Mi donacas al la kongresa kaso.
 12. Mi samtempe pagas kongreskotizo
..... donaco
.....

al:

.....

dato subskribo

Bonvolu sendi tiun ĉi aliĝilon kun la kvitanckupono por la pagita sumo al la
L.O.K.: Kaj Pedersen, Brønshøjvej 62, København. Ĉiu plenigu propran ali-
ĝilon.

- 1, 2, 5 en nacia lingvo
3, 4, 6, 8, 9 en Esperanto